



Ni Semas Esperanton

Sesmonata Bulteno

Julio 2019 n-ro: 5



Ĝisrevido

Kiel diras la konata kanto “Maljunaj soldatoj neniam mortas, ili simple formalaperas”. Nun post pli ol 10 jaroj venis la momento por mi retiriĝi el la kunordigado de la Komisiono por agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA (MONA) kaj lasi la lokon al pli junaj fortoj.


La liston de homoj, kiujn mi devas danki pro la laboro kaj kunlaboro dum la pasintaj jaroj estas tro longa kaj verŝajne ne sufiĉus ĉi tiu tuta enkonduka paĝo. Ni atingis multon ĉefe en la periferiaj landoj de nia regiono, sed ni ankoraŭ ne sukcesis firme enplanti Esperanton en arablingvaj landoj. Tio restas la ĉefa tasko de la venonta generacio.

Bonan laboron al la venonta komisiono!

Amike,
Renato Corsetti

MONA Informado

Esperanto en MONA regiono, la Mez-Orientaj, Nord-Afrikaj kaj najbaraj landoj



Esperanto

Ἑσπεραντό



الاسبرانتو اسپرانتو

Էսպերանտո אספרנטו

EKO Tempolinio Komisiono Kunvenoj Informilo MONA Bulteno Pri ni Kontaktoj

Aperis la 4-a MONA Bulteno.


Por elŝuti ĝin kaj la antaŭajn numerojn aŭ por legi la lastan numeron rete bonvolu iri al la menuero "MONA Bulteno".

Ne forgesu ke vi povas aboni al nia retejo libere lasante vian retpoŝtadreson. Por tio bonvolu iru al la dekstra flanko de la retpaĝo.

Jen ligilo por la menuero:

<https://monainformado.wordpress.com/2017/07/06/mona-bulteno/>

<https://monainformado.wordpress.com/>



<https://monainformado.wordpress.com/>

Tago de la Gepatra Lingvo / Ana Dil Günü (21/2/2019)

Aperis la turka versio de la teksto kaj afiŝo por la ĉijara informado pri "Tago de la Gepatra Lingvo" festota en la 21-a de februaro. Jen la ligilo:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2019/21-Subat-2019-Uluslararası-Ana-Dili-Gunu-2019-Uluslararası-Yerli-Diller-Yili.html#TR>

Her sene olduğu gibi bu sene de 21 Şubat'ta kutlanacak olan "Ana Dil Günü" için ilgili metin ve afişler aşağıdaki linkte yayınlandı:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2019/21-Subat-2019-Uluslararası-Ana-Dili-Gunu-2019-Uluslararası-Yerli-Diller-Yili.html#TR>



Danke al plurnacia kunlaboro en la kadro de la kontinentaj komisionoj de UEA kaj danke al subvencio de ESF aperis la kurda kaj taĝika versioj de la konata lernolibro de Stano Marček.

Dankon al ĉiuj kunlaborintoj!

Cetere neniam antaŭe aperis lernolibro pri Esperanto en unu el la variaĵoj de la kurda lingvo. La apero de la lernolibroj, tamen, estas nur la komenco de la laboro. Nun oni devas trovi interesiĝantojn en tiuj regionoj kaj verŝajne oni devos sendi la lernolibrojn senpage konsidere de la ekonomia situacio. Ni provos ebligiton per la Fondaĵo MONA ĉe UEA kaj per la helpo de KAEM rilate Taĝikujon.

Sendu viajn donacojn, sed malgrandajn al la konto 'arabio' ĉe UEA kun la indiko "por la kurda [aŭ tagika] lernolibro" kaj ni povos eĉ skribi vian nomon [donacita de] en la sendotan libron.

Pagmenieroj al UEA ĉe: <https://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj>.

Dankon nome de tiuj, kiuj ne eĉ povas akiri lernolibron pri Esperanto!

Renato Corsetti
Kunordiganto de MONA



Ĝenerala Grammatiko de Esperanto
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková.
Al la kurda tradukis Ŝilér Kerimí Kani.
Martin: La aŭtoro, 2019. 114p. 25cm.
ISBN 9788089312375. € 7,50.



Ĝenerala Grammatiko de Esperanto
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková.
KD kun la kurda lernolibro en pdf-formato kaj "Modela elparolo" en mp3. Martin: La aŭtoro, 2019. € 15,00.



Hudomuzi zaboni Esperanto
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková.
Al la taĝika tradukis Фирдавс Шукуров.
Martin: La aŭtoro, 2019. 114p. 25cm. ISBN 9788089312368. € 7,50.



Hudomuzi zaboni Esperanto
Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková.
KD kun la taĝika lernolibro en pdf-formato kaj "Modela elparolo" en mp3. Martin: La aŭtoro, 2019. € 15,00

Ankaŭ Zamenhof estis komencanto

(3/2/2019)

La vivo de komencanto estas la plej bela periodo en la vivo de esperantisto. Oni malkovras, ke Esperanto, kiam oni parolas ĝin, estas pli komprenebla ol oni imagis, oni malkovras la aliajn esperantistojn, kiuj ĝenerale estas interesaj homoj, oni malkovras ke la verkoj de bonaj verkistoj estas legeblaj sen vortaro. Ĝuste por la komencantoj aperis NOVA RETEJO DE UEA EN SIMPLA ESPERANTO. Ĝia nomo estas [uea.facila](https://uea.facila.org), kaj ĝi estas videbla ĉe: <https://uea.facila.org>. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj

komenti. La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperanto-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj.

El Popola Ĉinio ĵus konsilis ĉinajn komencantojn legi ĉi tiun artikolon: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/%C4%89u-la-unua-scienc-fikcia-libro/>

Legu ĝin ankaŭ vi, kaj se vi volas esti daŭre informata pri novaj artikoloj aliĝu en Facebook al la grupo [uea.facila](https://www.facebook.com/uea.facila)

Renato Corsetti
Kunordiganto de MONA



uea.facila
FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

Karaj geamikoj,

Morgaŭ (vendrede) vespere je la 21h la israela ŝtata televido elsendos 12-minutan programon pri Esperanto en Israelo. Ĝi estis filmita i.a. en la Tel-Aviva E-klubo, kiun vizitis tiufoje s-anoj de Serbio kaj Svislando, kaj en la du E-kursoj, instruitaj de Janaj kaj Eldad, kiuj estis plenplenaj (vidu la fotojn). Cetere estis intervjuitaj kelkaj s-anoj (Amri kaj Tali Wandel, Doron Modan, Israela) kiuj rakontis pri siaj personaj spertoj en E-o.

Venontan lundon koncertos en nia klubo la litova E-bardo Edgar de SEPA, kiun vi konas de la du lastaj Israelaj Kongresoj. En la programo: kantoj modernaj, irlandaj, country, komponaĵoj kaj kompreneble kantoj en Esperanto.

Ĝis la revido en la klubo,

Amri Wandel
Prezidanto de ELI



La 12-a MezOrienta kaj NordAfrika (MONA) Kunveno de Esperanto en Kaŝano, Irano

(4/4/2019)

**La 12-a MezOrienta kaj NordAfrika (MONA)
Kunveno de Esperanto en Kaŝano, Irano,
28-31 de marto 2019**



Parto de la kunvenanoj en la kunvenejo

שלום חברים,
מחר תשודר ביומן שישי בשעה 21:00 בערוץ 11 כתבה בת 12 דקות על האספרנטו בישראל. צילומים נערכו ביום שני במועדון האספרנטו בת"א, בו ביקרו באותו מפגש אספרנטיסטים מסרביה ושוויצריה, ובקורסים לאספרנטו בהדרכת ינאי ואלדד, שהיו מלאים עד אפס מקום (ראו בתמונות). כמו כן התראיינו לתכנית כמה חברים: עמרי, טלי, דורון ישראל, שסיפרו על חווית האספרנטו שלהם ביום שני הקרוב (18.2) יופיע במועדון זמר האספרנטו מליטא אדגר, הזכור לנו מופעותיו בכנסי האספרנטו באשקלון ועכו. הוא ינגן שירים מודרניים, אירלנדיים, בסגנון קנטרי ויצירות שלו, וכמובן שירים באספרנטו, להתראות במועדון עמרי

La 12a MONA kunveno kun rekorda nombro de 36 partoprenantoj el entute 11 landoj okazis en Irano, kiel la unua internacia Esperanto-kongreso en la lando. Elde 36 partoprenantoj, 18 estis el eksterlando kaj 18 el 5 urboj de Irano. El Francio partoprenis 6 samideanoj, kio estis la plej alta nombro ol tiu de ĉiuj aliaj landoj.

La ĉefaj organizanto de la kunveno eksterlande estis prof. Renato Corsetti kun helpo de s-ino Annie Grente, kaj enlande estis inĝ. Nazi Solat, kun helpo de d-ro Keyhan Sayadpour kaj s-ro Suruŝ Mohammadzade.



Prof. Renato Corsetti preleganta en MONA-12, kies ĉefa ekster-irana organizanto ankaŭ estis li

La plejmulto de kunvenoj ekvojis matene de Tehrano la 28an de marto perbuse kaj ĝuis ĉ. 4-horan veturadon al Kaŝano vidante diversspecajn pejzaĝojn survoje. Post enhoteliĝo kaj tagmanĝo en Kaŝano, okazis komuna vizito al kelkaj historiaj domoj kaj banejoj en la antikva parto de la urbo. Pri tiuj historiaj konstruaĵoj – kaj ankaŭ preskaŭ pri ĉiuj aliaj vidindaĵoj en kaj apud Kaŝano, kiuj estis planitaj kiel vizit-celoj dum la kelktaga kunveno – jam antaŭe esperant-lingvaj artikoloj estis enmetitaj en la Vikipedion kaj pri tio ĉiuj MONA-partoprenantoj estis informitaj pere de WhatsApp-grupo, kion bonvole estigis s-ino Annie Grente. Tiaj artikoloj alireblis/as ankaŭ tra:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ka%C5%9Dano#Vidinda%C4%B5oj_en_Ka%C5%9Dano

Prof. Renato Corsetti komencis la kunvenon en la mateno de la 29a de marto en la kunvenejo, salono en Ĥaneje Nogli (La Eta Domo), hotelo kiun oni konstruis el kelkaj tradiciaj kaj historiaj domoj en Kaŝano, eble la plej malnova urbo en Irano (ĉ. 8000 jarojn antaŭe).

Prof. Corsetti koncize prezentis pri antaŭaj MONA-oj kaj la nuna situacio de la movado en MONA-landoj. Fine de lia prelego, li respondis al diversaj demandoj de la kunvenantoj.

La dua ero de la kunvena programo estis tre interesa kaj bonvenigita prelego de s-ino Maria Butan el Francio pri “La Pejzaĝo kaj ĝia Influo sur Nin”. En siaj paroloj ŝi pritraktis diversajn difinojn, eldirojn kaj teoriojn de kompetentuloj rilate al pejzaĝo, kaj prezentis demandojn al la aŭskultantoj pri impresoj, kiujn diversaj pejzaĝoj estigas en nin, aŭ tio, kion nia animstato aldonas al de ni rigardataj pejzaĝoj.

Poste s-ino Annie Grente, fracino nun loĝanta en Grekujo – kiu jam de tagoj antaŭe ekestis en Kaŝano, kaj sukcesis varbi kelkajn surlokajn irananojn invitante ilin partopreni tiun aŭ alian parton de la kunveno/ ekskuroj – parolis subtitole de “Portretoj de Mezoriantaj Rifuĝintoj”. Ŝi rakontis pri kortuŝa situacio

de rifuĝintoj kaj detaligis pri tio, kio okazas por ili en la insulo Samos, Grekujo. Ŝi gvidas lingvajn kursojn tie – kaj iam prezentas ankaŭ Esperanton al la rifuĝintoj.

Post la irana tradici-menua tagmanĝo, okazis ekskurso al la antikva kaj miriga subtera urbo Nuŝabado, kiu aĝas pli ol 1500 jarojn, sed estis malkovrita nur antaŭ ĉ. jardeko. Ĝia diametro estas pli ol 4 kilometroj kaj konstruiĝis en tri etaĝoj. Post tio okazis vizito al vidinda dezerto apud Kaŝano, kie videblis kameloj ĉe rapidaj por-dezertaj veturiloj en ege bona vetero kun mallonga promenado kaj montet-grimpo fare de la samideanoj. Samtage, ankaŭ karavanejo estis vizitata apude.

La 30an de marto d-ro Keyhan Sayadpour, la eksprezidanto de Irana Esperanto-Asocio (IREA), komencis tre viglan aŭkcion, en kiu diversaj Esperanto-libroj kaj aliaj Esperanto-objektoj vendiĝis por la kaso de IREA, je totala sumo de ĉ. 80 eŭroj.

Poste Inĝ. Nazi Solat, la prezidantino de IREA kaj la ĉef-organizanto de la kunveno en Irano, parolis pri “La Esperanto-Movado en Irano: Historio kaj Nuntempo”. Ŝi komencis de la unuaj paŝoj – pli ol cent jarojn antaŭe – ĝis la nuna tempo, prezentante gravajn personojn, librojn, kunvenojn kaj okazaĵojn, inter la plej lastaj estis kvin Iranaj Esperanto-Kongresoj dum la lastaj sinsekvaj kvin jaroj.



Inĝ. Nazi Solat, la prezidantino de IREA kaj la ĉef-organizanto de MONA-12 en Irano

El Svisio, s-ino Mireille (Mirejo) Grosjean, la prezidanto de ILEI, ege plaĉe kaj sprite prelegis “Pri Eksteraj Rilatoj ĉe UN en Ĝenevo Nome de UEA”. Ŝi rakontis en tia posteno, kiel oni devas esti preta por ekreagi laŭ la – iam tute neatenditaj – demandoj far eminentuloj politikaj.

Post tradici-persa tagmanĝo en la duonkovrita centra korto de la restoracio de la kunvenejo, s-ro

Benjamin Kwiecien el Usono, kiu nuntempe studas la persan lingvon ĉe la Ferdouŝia Universitato en Maŝhado, Irano, prezentis interesan – ankaŭpor perslingvaj kunvenanoj – prelegon titolitan “Kio estas Komuna kaj Malkomuna inter la Persa kaj Esperanto”, dum kiu li menciis kaj gramatikajn kaj leksikajn similaĵojn kaj malsimilaĵojn inter la du lingvoj. Aglutineco kaj vortfarado de kunmetitaĵoj ŝajnas la plej okulfrapa trajto komuna inter la persa kaj Esperanto. Demandoj de la aŭskultantoj kaj liaj respondoj tiom allogis la ĉeestantaron, ke oni planis la daŭrigan parton por la sekva mateno.



Benjamin Kwiecien el Usono preleganta komparante pri la persa kaj Esperanto

Poste okazis ekskurso al la historia Ĝardeno Fin, kiu estas la plej bone restita pers-stila ĝardeno el la antikva Persujo. Tiajn ĝardenojn kvaronigas krucoj en la mezo, aludante al la kvar ĉefaj elementoj sanktaj en la praaj iranaj religioj kiel zoroastrismo kaj mitraismo: akvo, tero, fajto kaj vento. La ĝardenoj kun abundaj verdaĵoj, floroj, arboj kaj akvovojoj kun fontanoj, reprezentas ankaŭ la paradizon. Plejmulto de la kunvenanoj de la ĝardeno poste iris al la tradicia bazono de Kaŝano, dum d-ro Sayadpour akompanis s-ro Daneŝ por prepari tradician pers-stilan vespermanĝon por gesamideanoj revenontaj hotelen.



Parto de kunvenanoj vizitantaj Banejon Fin

Post la vespermanĝo, Ing. Ahmad Reza Mamduhi, la unua kaj la nuna ĉefdelegito de UEA en Irano, prelegis pri la “Universitata Agado en Irano kaj Internacia Universitata Interago”. Rakontinte pri tio, kio okazis speciale en la Universitato Allame Tabatabai (ATU), i.a. fondiĝo de Esperanto-Klubo de ATU en la lasta Zamenhof-Tago, li proponis ĉiuaspektan interagadon inter la universitatoj, en kiuj Esperanto estas instruata, ekz-e por prepari kursmaterialon konsistanta el la plej allogaj kaj gravaj temoj, kiuj kaj povas helpi al Esperanto-Movado, kaj povas helpiĝi pere de ĝi. Temoj kiel “La Baza Enspezo” –tute senpaga mono pagata al ĉiuj civitanoj – kio povas ege kontribui al realigado de ankaŭ la “tut-tempaj Esperantistoj”, kiuj povos multe pli rapidigi disvastigon de nia lingvo; “La Lernejo de Vivo” iniciato de Alain de Botton, kio lernigas al homoj kiel vivi, kaj ne nur kiel akiri datumojn el la universitatoj; tio, kion prezentas Y. N. Harari en siaj verkoj “Homo scia – Sapiens, Mallonga Historio de Homaro” kaj “Homo Di(ec)a, Mallonga Historio de Morgaŭno”, i.a. pri tio, ke revolucioj preskaŭ ĉiam estis gajnitaj fare de tre limigita nombro de homoj, kiuj kaj estis bone interligitaj, kaj bonege kaj unuanime sciis, kion ili volas precize: ankaŭ ni nombre limigitaj esperantistoj se bone havigu al ni tiujn ĉi du trajtojn, ni povas realigi kulturalan revolucion, aŭ la finan venkon – universitatoj eble povas roli grave por tion atingi; kiel naciaj

longhistoriaj lingvoj povas riĉigi la junan lingvon Esperanton – kaj inverse; kaj kiel multaj aliaj Antoj, kiel Farsanto kaj Persanto, Inĝliŝanto kaj Anglanto, ... povas faciligi la lernadon de Esperanto kaj la naciaj lingvoj.

La lastan tagon de la prelegoj en Kaŝano, komencis Benjamin daŭrigante sian hieraŭan prelegon pri la persa kaj Esperanto, anstataŭ Taled Orabi el Uzbekistano, kiu bedaŭrinde ne povis veni al Irano kaj prezenti sian prelegon “Etaj Ŝanĝoj, Egaj Rezultoj”.

La posta preleganto estis Mirejo, kiu prezentis sian duan prelegon en la kunveno, kio estis ege ŝatata kaj pridiskutita kun la ĉeestantoj: “Kiam Elefantoj Batalas, la Herbo Suferas: Vundaj lokoj en la Mondo”. Ŝi diligente kaj ŝerceme parolis pri siaj interesaj travivaĵoj en Tajvano, Nepalo kaj Nord-Koreio.

La lastan prelegon de la kunveno prezentis s-ino Tatjana Loskutova el Rusio pri “Esperanto en Uzbekistano”. Ŝi montrante sian lumbildaron pri la temo, klarigis pri la movado kaj ĉefaj movadanoj en Uzbekistano.

Post la lasta tagmanĝo en Kaŝano, la kunvenanoj reiris al Tehrano por ekskursoj al la Palaco Golestano kaj La Nacia Muzeo de Irano en al 1a de aprilo, kaj poste havis viziton al IREA-oficejo, kiu estis aĉetita

por la Asocio antaŭ ĉ. 8 monatoj pere de d-ro Sayadpour kaj kelkaj aliaj IREA-membroj.

Fine de la vizito, eksterlandaj samideanoj malavare monhelpis al IREA entute pli ol 100 eŭrojn.



Vizito al la nove aĉetita oficejo de IREA

Parto de la kunvenanoj partoprenis en la Nacia Tago de la Naturo en Irano en la 2a de aprilo, kio estas la 13a tago de la Novjaro en la persa kalendaro, dum kiu ĉiuj faras piknikon en la naturon bonvenigante la printempon.

Ĉi tiun raporton verkis **Ahmad Reza Mamduhi**

Rakontoj de 1,001 noktoj

(7/4/2019)

Kiam estis la tria nokto, Dunjazard petis sian fratinton fini la rakonton. “Kun plezuro,” diris Ŝahrazad kaj daŭrigis: “Mi aŭdis, ho bonŝanca reĝo, ke la tria maljunulo diris al la feo pli rimarkindan rakonton ol la aliaj du, kaj en lia mirigo kaj ĝuo la ifrito donacis al li la ceteran parton de la sango-ŝuldo kaj permesis al la komercisto foriri libere. Liaflanke, la komercisto iris kaj dankis la maljunulojn, kiu gratulis lin pro lia savo, post kio ĉiu foriris hejmen. Tio tamen ne estas pli mirinda ol la rakonto de la fiŝkaptisto.” Kiam la reĝo demandis, kio tio estas, ŝi daŭrigis:

Mi aŭdis, ho bonŝanca reĝo, ke iam estis malriĉa, maljuna fiŝkaptisto kun edzino kaj tri infanoj, kiu havis la kutimon ĵeti sian reton ekzakte kvar fojoj ĉiutage. Li iris al la marbordo tagmeze iun tagon, metis sian korbon surteren, refaldis sian ĉemizon, vadis en la maro kaj ĵetis sian reton. Li atendis ĝis la reto profundigis malsupren antaŭ ol li tiris la ŝnurojn kune kaj tiam, trovante ĝin peza, li provis malsukcese treni ĝin eksteren. Li prenis unu finon de ĝi al la bordo kaj fiksas ĝin al keĵlo kiun li portis tien, kaj post tio li senvestiĝis kaj plonĝis en la maron apud ĝi, kie li daŭre tiris ĝin, ĝis li sukcesis preni ĝin supren. Li elgrimpis kun ĝojo, surmetis siajn vestaĵojn reen kaj li iris al la reto, nur por malkovri ke tio, kio estas en ĝi,

estas morta azeno, kaj ke la azeno faris truon en la reto. La fiŝisto estis afliktita de tio kaj recitis la formulon: “Ne ekzistas potenco kaj neniu forto krom Dio, la Supera, la Ĉiopova,” antaŭ ol diris: “Tiu estas stranga afero, ke Dio donis al mi kiel manĝaĵon!” Kaj tiam li recitis:

*Se vi serĉas la danĝeron, naĝe en malluma pado,
Vi rezignu, ĉar nur Dio zorgas pri la pan-gajnado.
Fiŝkaptisto iras nokte perlabori sian panon;
Jen la maro sub ĉielaj steloj. Dio havis planon.
Kaj li plonĝas en la maron tamen ja en malkvieto,
daŭre la okuloj iras nur al moviĝanta reto.
Li feliĉas pro la nokto, kaj reiras al hejm-loko,
Unu fiŝo havas sian grandan buŝon en la hoko.
Tiu fiŝon li je granda prezo vende tuj kolportas,
Al homo jes varmiĝanta, kiu hejme tre komfortas.
Gloro estas nia Dio, kiu donas kaj forprenas;
Unu homo manĝas fiŝon kaj la dua kapti penas.*

Li kuraĝigis sin, dirante, ke la ĉiopova Dio favoros lin kaj li recitis:

*Se vi frontas malfacilon kaj ne havas bonan gvidon,
Vestu vin per pacienco, prenu bonan la decidon.*

*Ne al ĉiopova dio plendu, kiel apostato,
Sed al tiuj kiuj al li plu rigardas sen kompato.*

Li liberigis la azenon el la reto, tordis la reton antaŭ ol denove li lanĉis ĝin kaj iris reen al la maro.

Alpreĝante la Nomon de Dio, li faris alian ŝetadon, atendis ĝis la reto estis enlokiĝinta, kaj trovis ĝin eĉ pli peza kaj pli malfacila movebla ol antaŭe. Pensante ke ĝi devas esti plena de fiŝoj, li ligis ĝin al la keĵlo, demetis siajn vestojn kaj subakviĝis en la maro por liberigi ĝin. Post tirado de ĝi forte li alportis ĝin al la bordo, nur por malkovri ke tio estis granda kruĉo plena je sablo kaj koto. Afliktita de tiu vido, li recitis:

*Ho problemoj de la tempo, por rezigno jen kondiĉo.
Haltu, eĉ se por vi ne jam devus esti ĝen-sufiĉo.
Mi eliris serĉe de la ĉiutaga mia pano,
Sed mi trovis ke mi vagas en kompleta tuta vano.
Multajn fojojn jen stultulo venas al plej fora stelo
sed saĝuloj multaj kuŝas ja surtere aŭ en kelo!*

La fiŝkaptisto forĵetis la poton, tordis sian reton, purigis ĝin kaj reiris por la tria fojo al la maro, petante je Dio pardonu lin. Li faris sian ŝetadon kaj atendis ĝis la reto enlokiĝis antaŭ ol li tiris ĝin, kaj ĉi foje tio, kion li trovis en ĝi estis eroj de potoj, boteloj kaj ostoj. Li estis furioza kaj, verŝis amarajn larmojn, li recitis:

*Pri la viv-rimedoj viaj mankas al vi la sekuro;
Ĝin ne portos al vi iam klero aŭ literaturo.
Bona ŝanco kaj nutraĵo estas aĵoj malsamspecaj,
kiel landoj, kiuj estas aŭ fekundaj aŭ sekecaj.
Ŝanĝoj dum la temp' mallevas el la trono homojn
klerajn,
Dum bonŝanco surtronigas homojn tute sci-mizerajn.
Morto venu, kaj minprenu, for el vivo-embaraso;
Falkoj jen alterigitaj por ke flugu nun anaso.
Vin ne igu mira homo ja malriĉa sed scienca
dum alia estas rekte malsupera sed potenca.
Estas birdoj, kiuj devas flugi eĉ al oriento,
dum alia ja ricevas manĝon sia sub tegmento.*

Li tiam rigardis supren al la ĉielo kaj diris: "Ho mia Dio, Vi scias ke mi nur ŝetas mian reton po kvar fojojn tage. Mi faris tion jam trifoje kaj akiris nenion, tial ĉifoje donu al mi ion per kio mi vivu." Li prononcis la nomon de Dio kaj ŝetis sian reton en la maron. Li atendis ĝis ĝi enlokiĝis kaj tiam li provis tiri ĝin, sed trovis ke ĝi estis kaptita en la fundo. Li recitis la formulon: "Estas neniu potenco kaj neniu forto krom Dio", kaj daŭrigis:

*Kiom aĉa estas nia bela kaj malbona mondo
kiu lasas la gefilojn en sufera vivo-ondo.*

*Eble en mateno ĉio ŝajnas esti tute bone
sed vespere en veneno-glaso mi enfalas drone.
Al demando: "Ĉi-momente kiu bonan vivas vivon?"
La respondo, ke mi vivas tiel, estas sen motivo.*

La fiŝkaptisto demetis siajn vestojn kaj, post subakviĝo, li kun sia plej forta povo trenis la reton al la bordo. Tiam, kiam li malfermis ĝin, li trovis en ĝi latunan botelon kun plumban sigelon, sur kiu estis la subskribo de nia mastro Salomono (2), filo de Davido, al ambaŭ el kiuj estu paco. La fiŝisto estis ĝojigita vidi ĉi tion, dirante al si, ke ĝi valoras dek orajn dinarojn, se li vendas ĝin en la kupro-merkato. Li skuis ĝin kaj, malkovrante ke ĝi estis peza krom sigelita, li diris al si: "Mi scivolos kio estas en ĝi? Mi malfermu ĝin kaj rigardu antaŭ ol vendi ĝin." Li elprenis tranĉilon kaj prilaboris sur la ŝtopilo, ĝis li eltiris ĝin de la botelo, kiun li tiam metis sur la grundo, kaj skuis la botelon por elverŝi la enhavon. Je lia miro, unue nenion elvenis, sed poste aperis fumo kiu leviĝis supren al la ĉielo kaj etendiĝis super la surfaco de la grundo. Kiam la tuto de la fumo estis eksteren, ĝi kolektiĝis kaj konkretiĝis; tremo trakuris ĝin kaj ĝi fariĝis ifrito kun kapo en la nuboj kaj la piedoj sur la tero. Lia kapo estis kiel kupolo, liaj manoj estis kiel forkoj de ventumilo por grajnoj kaj liaj piedoj kiel mastoj de ŝipo. Li havis buŝon kiel kaverno kun dentoj kiel rokoj, dum lia naztruoj estis kiel kruĉoj kaj liaj okuloj kiel lampoj. Li aspektis malhela kaj sulkiĝanta.

Vidante ĉi tiun ifriton, la fiŝkaptisto ekstermis; liaj dentoj interfrapiĝis; lia buŝo sekiĝis kaj li ne povis vidi kien li iris. Vidante lin la feo ekkriis: "Ekzistas neniu dio krom la Dio de Salomono, Lia profeto. Profeto de Dio, ne mortigu min ĉar mi neniam malobeos vin en vorto aŭ ago." Ifrito," la fiŝkaptisto diris, "Vi parolas pri Salomono, la profeto de Dio, sed Salomono mortis antaŭ mil okcent jaroj kaj ni vivas en la lasta tempo de la mondo. Kio estas via rakonto kaj kiel vi eniris en tiun botelon?" Je kio la ifrito respondis: "Ne ekzistas dio krom la Dio. Mi havas bonajn novaĵojn por vi, fiŝkaptisto. "Kio estas tio?" La fiŝkaptisto demandis, kaj la feo diris: "Mi nun tuj mortigos vin la la plej malbona morto-maniero." "Pro tiu bona novaĵo, ĉefo de la ifritoj," kriis la fiŝkaptisto, "vi meritas ke la Dia protekto estu formetita de vi, vi malbenita kreitaĵo. Kial vi mortigos min kaj kion mi faris por meriti tion? Estis mi kiu savis vin el la fundo de la maro kaj venigis vin sur la teron.

Sed la ifrito diris: "Elektu kian morton vi volas kaj kiel vi volas, ke mi mortigu vin." "Kian malĝustaĵon mi faris," demandis la fiŝkaptisto, "kaj kial vi punas min?" La ifrito respondis: "Aŭskultu mian rakonton," kaj la fiŝkaptisto diris: "Rakontu, sed mallongigu ĝin ĉar mi

estas en miaj lastaj spiroj. “Sciu, fiŝkaptisto,” la ifrito diris al li, “ke mi estis unu el la kontraŭreligiaj feoj, kaj kiu kune kun Ŝaĥr, la feo, mi rebelis kontraŭ Salomono, filo de Davido, al ambaŭ el kiuj estu paco. Salomono sendis sian veziron, Asaf, venigi min al Li sub trudado kaj mi devis akompani lin en stato de humiliĝo kaj stari antaŭ Salomono. “Mi rifuĝas ĉe la Dio!” ekkriis Salomono, kiam li vidis min, kaj li tiam proponis min konvertiĝi al la Fido kaj proponis, ke mi eniru en sia servo. Kiam mi rifuzis, li venigis tiun botelon, en kiu li malliberigis min, sigelante ĝin kun plumbo kaj surskribante ĝin per la Plej Granda Nomo de Dio. Tiam, laŭ lia ordono, la feoj portis min kaj forĵetis min en la mezo de la maro.

“Dum cent jarojn mi restis tie, promesante al mi mem, ke mi donus al iu ajn, kiu liberigus min sufiĉan riĉecon por lia tuta vivo, sed la jaroj pasis kaj neniu savis min. Dum la sekvaj cent jaroj mi diris al mi, ke mi malfermus ĉiujn trezorojn de la tero al mia savanto, sed denove neniu savis min. Kvarcent jarojn poste, mi promesis, ke mi plenumos tri dezirojn, sed mi ankoraŭ estis malliberigita, do mi fariĝis furioze kolera kaj diris al mi mem ke mi mortigos tiun, kiu savos min, donante al li la elekto de kiel li volos morti. Estas vi kiu estis mia savanto, do mi permesos al vi ĉi tiun elekton.”

Kiam la fiŝkaptisto aŭdis tion, li ekkriis en miro pri sia malbona sorto liberigi la ifriton nun, kaj li daŭrigis: “Indulgu min, Dio bonvole indulgos vin, kaj vi ne mortigu min, por ke Dio ne metu vin en la povon de tiu, kiu mortigos vin.” “Mi devas mortigi vin”, insistis la feo, “do elektu, kiel vi volas morti” Ignorante tion, la fiŝkaptisto provis alian alvokon, li invitis la ifriton montri

dankemon pro lia liberigo. “Ĉar ke vi liberigis min, mi mortigos vin,” ripetis la ifriton, je kio la fiŝkaptisto diris: “Sinjoro de la ifritoj mi faris al vi bonon kaj vi repagas min per malbono. La proverbaj linioj estas ĝustaj, kie ili diras:

*Ni al ili faris bonon, ili dankis per malbeno,
kaj je Dio tio estas pagi dolĉon per veneno.
Helpi iun sen merito, kiu estas al vi ĝeno,
estas kiel tre klopodi por la savo de hieno.*

“Ne daUrigu tion, tiom longe,” diris la ĝino aŭdinte ĝin, “ĉar morto alproksimiĝas al vi.” La fiŝkaptisto diris al si: “Li estas feo kaj mi estas homo. Dio donis al mi sanan inteligentecon, kiun mi povas uzi por malkovri manieron detrui lin, dum li nur povas uzi nur senkompatan ruzajon.” Do li demandis: “Ĉu vi certe mortigos min?” Kaj la feo konfirmis tion, kaj la fiŝkaptisto daŭrigis: “Mi petegas vin je la Plej Granda Nomo enskribita sur la sigelo de Salomono, kaj petas vin doni al mi veran respondon al demando, kiun mi havas.” “Mi respondos”, respondis la ifrito, estante skuita kaj ĝenita per la mencio de la Plej Granda Nomo, kaj li daŭrigis: “Demandu vian demandon sed ĝi estu mallonga.” La fiŝkaptisto daŭrigis: “Vi diris ke vi estis en tiu botelo, sed ne estas spaco en ĝi por via mano aŭ piedo, mi ne parolu pri la resto de via korpo.” “Ĉu vi ne kredas, ke mi estis en ĝi?” demandis la ĝino, al kiuj la fiŝkaptisto respondis: “Mi neniam kredos, ĝis mi vidos ĝin per miaj propraj okuloj.”

Mateniĝis kaj tagiĝis, kaj Ŝahrazad ĉesis paroli, laŭ la permeso, kiun ŝi estis havinta.

Plie pri la Mez-Orienta Kunveno

(16/4/2019)



Kie en okcidentaj landoj oni trovas landan asocion, kiu aĉetas sian sidejon en la centro de la ĉefurbo, kiel ĵus faris la irana landa asocio de UEA? Kie oni trovas instruadon de Esperanto al universitataj studentoj en la kadro de la plej prestiĝa universitato en la ĉefurbo kaj en aliaj universitatoj de la lando? Kie oni trovas gejunulojn, kiuj senprobleme kunlaboras kun la pli aĝaj esperantistoj kiel egaluloj?

La respondojn al tiuj demandoj oni malkovris dum la **12-a Mez-Orienta Kunveno** de la 28-a ĝis la 31-a de marto. En plaĉe antikva konstruaĵo en la urbo de tapiŝoj kaj kaheloj, Kaŝano, oni aŭskultis serion da prelegoj pri la stato de la movado en Irano kaj en aliaj mez-aziaj landoj. Mi estis trafita de la kvanto de agadoj kaj eldonaĵoj de la irana movado. Ĝi havas grupojn en ĉiuj gravaj urboj, kaj tre aktive sentas respondecon pri ili.

Alia interesa fakto pri la irana movado estas ĝia seninterrompa ekzisto tra ĉiuj politikaj ŝtormoj de la pasinta jarcento. Ni ankaŭ aŭdis raportojn pri la stato de Esperanto en Uzbekujo, Taĝikujo kaj aliaj mez-aziaj

landoj, Estis interŝanĝitaj planoj pri komunaj agadoj en Meza Azio. Pro la ĉeesto de Mireille Grosjean, prezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), ni aŭdis pri problemoj en la okcidento, ekzemple kiel funkcias la nova kotiz-sistemo de UEA en lando, el kiu oni ne rajtas sendi monon eksterlanden pro internaciaj malpermesoj.

Tio estis la plej granda Mezorianta Kunveno de la lastaj jaroj. Venis partoprenantoj el Belgujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Rumanujo, Rusujo, Svislando kaj Taĝikujo.

Dum la kunveno okazis ankaŭ AMo-Seminario (Aktivula Maturigo). La plej konkretaj rezultoj de tiu seminario verŝajne estos plifirmigo de kontaktoj kaj agadoj en Meza Azio kaj la entuziasmigo de iranaj samideanoj. Multaj el tiuj lokaj esperantistoj la unuan fojon spertis internacian kunvenon en sia lando. Por ili tiu sperto estis simila al la sperto de la kongresanoj ĉe la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro.

Renato Corsetti
Kunordiganto de MONA

Fonto:
<https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/plie-pri-la-mez-orienta-kunveno/>



Sukcesa Israela Kongreso kaj Postkongreso tra Israelo kaj Jordanio

(21/4/2019)

Karaj geamikoj,
Antaŭ unu semajno finiĝis la 20-a Israela Kongreso en Eilat, sekvata de la MONA-kunveno en Akaba kaj de tri sinsekvaj postkongresaj ekskursoj – al Petra (Jordanio), al la Morta Maro, Jeriko, Jerusalemo kaj Tel-Avivo (finiĝinta hodiaŭ) kaj al la nordo de Israelo (Haifa, Akko, Nazareto...) kiu komenciĝos morgaŭ. Entute du semajnoj en Esperantujo. Partoprenis pli ol 50 personoj, el ili 23 eksterlandanoj, la dua plej granda Israela Kongreso post tiu de 2013 (la Azia Kongreso). Kiel en 2013, muzikis Kajto kaj Jomo. La riĉa programo estas videbla en la kongresa retejo, <http://esperanto.org.il/IK20/index.php/Kongreso/Programo>
Aldone raporto pri la Kongreso, aperonta en La Ondo de Esperanto, kaj kelkaj fotoj. Multaj pli troveblas en Facebook. <https://www.facebook.com/amri.wandel>
Amike,

Amri Wandel
La organizanto

שלום חברים,
לפני שבוע הסתיימם כינוס האספרנטו הישראלי ה-20 באילת ואחריו התקיימו כינוס וטיול בירדן (עקבה, פטרה) וטיול בישראל ים המלח, ירושלים, ת"א, חיפה, עכו, נצרת כינרת), בסה"כ שבועיים של אספרנטו

השתתפו למעלה מ-50 איש מהם 23 מחו"ל. התכנית מפורטת באתר הכנס <http://esperanto.org.il/IK20/index.php/Kongreso/Programo>
מצרף כמה תמונות וכתבה על הכנס שתתפרסם בביטאון האספרנטו תמונות רבות נוספות נמצאות בפיסיבוק.
<https://www.facebook.com/amri.wandel>
עמרי



Karaj geamikoj,

Hieraŭ, la 26.7, okaze de la Esperanto-tago, kiu la Israela radio intervjuis Amri en la populara programo de Emily Amrusi. La intervjuo aŭdebla en <https://www.kan.org.il/radio/item.aspx?pid=104493> ekde la tempo 1h26m.

Hodiaŭ fermiĝis la 104-a UK en Lahti. Partoprenis 5 Israelanoj: Yehuda Miklaf kaj lia edzino Maureen, kaj Amri Wandel kun lia edzino Gila kaj filino Tali. Inter iliaj kontribuoj: Yehuda salutis en la Inaŭguro nome de Israelo (video en <https://www.facebook.com/amri.wandel/videos/10219846350659117/>). Tali prezentis plurajn laborgrupojn pri eŭritmio kaj eŭritmiajn dancojn kadre de la Internacia Vespero vendrede. Amri gvidis la tablon de ELI dum la Movada Foiro (vidu foton), prelegis en la Internacia Kongresa Universitato, reprezentis ELI en la Komitato de UEA kaj la kunveno de KAEM (Azia Agado). Li ankaŭ elektiĝis kiel Estrarano de UEA (jam la kvaran fojon) kaj intervjuiĝis en la Pola Radio (http://pola-retradio.org/wp-content/uploads/2019/07/RetRadio_23.07.2019_mardo_876.mp3)

Amike,
Amri Wandel
Prezidanto de ELI

שלוםחברים,

ביום שישי, יום האספרנטו 26.7 שודר ברשת ב בתכנית "אמלי והפרופסור" ראיון עם עמרי. ראו

אמילי והפרופסור הראיון מתחיל בנקודת זמן 01:26:0

בשבת הסתיים קונגרס האספרנטו העולמי בפינלנד, בו השתתפו 5 ישראלים: יהודה מקלף ואשתו מורין, עמרי גילה וטלי. יהודה

ברך בשם ישראל בפתחה החגיגית

(<https://www.facebook.com/amri.wandel/videos/10219846350659117/>), טלי קיימה 3 סדנאות אוריתמיה,

והופיע בקונצרט הכרב הבינלאומי ביום שישי. עמרי ניהל כתמיד את השולחן הישראלי ביריד בערב הפתיחה (בתמונה וייצג את (IKU) המצורפת), הרצה במסגרת אוניברסיטת הכינוס Komitato אל"י בשיבות ה והתראיי לרדיו UEA הוא גם נבחר לוועד המנהל של KAEM. ופולין (קישור לעיל) עמרי



uea.facila estas nova retejo, kies celo estas informi novajn esperantistojn pri la Esperanto-movado per mallongaj, facillingvaj artikoloj. Vidu ekzemple jenan raporton pri la lasta Mez-Orienta Kunveno <https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/plie-pri-la-mez-orienta-kunveno/>

Krome ĝi enhavas ĝeneralajn legaĵojn, rekomendojn pri legolibroj por lernantoj, sinprezentojn de legantoj, kalendaron de renkontiĝoj, kaj multajn aliajn interesajn aferojn por homoj, kiuj la unuan fojon malkovras Esperanton. Serĉu: <https://uea.facila.org>.

The screenshot shows the homepage of uea.facila, featuring a navigation menu and a grid of article cards. The cards include:

- Nova retejo por novaj esperantistoj**: Verkis Anna Löwenstein en Ĝenerale. 10an de januaro. 12 komentoj 2249 vidoj.
- Homoj el 22 landoj vizitas Esperantuĵon**: Verkis Maurizio Giacometto en Kongresoj kaj kunvenoj. Hieraŭ je 11:31. 0 komentoj 89 vidoj.
- Vivo de Zamenhof**: Afisís Rico en Libroservo. 1 komento 224 vidoj.
- La surpriza magio de NASK**: Verkis Aŭtunjo Ward kaj Miĉo Harden en Kongresoj kaj kunvenoj. 1 komento 256 vidoj.
- Antaŭdiro de la ciganino**: Afisís Anna en Legajoj. 25an de julio. 0 komentoj 212 vidoj.
- Esperanto en scienca artikolaro**: Verkis Dima Ševĉenko kaj Anna Striganova en Ĝenerale. 4an de julio. 2 komentoj 350 vidoj.
- Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj**: Verkis Rob Moerbeek en Movado. 3an de julio. 3 komentoj 443 vidoj.
- Surpriza malkovro en Texel**: Verkis Eric Lee en Ĝenerale. 1an de julio. 6 komentoj 687 vidoj.

At the bottom of the page, there is a pagination bar showing "1 2 3 4 5 6 SEKVEN > Paĝo 1 de 10".